# Klaĉoj - paroliga ekzerco pri tempo-esprimoj

| | |
|---|---|
| **Celo:** | Ekzercado de tempo-difinoj, frazo-konstruado. |
| **Celgrupo:** | Komencantoj (jam konantaj tempajn adjektojn), komencintoj |
| **Antaŭpreparo:** | Tempo-kartoj por la ludantoj (vidu sube) |
| **Tempo:** | 5 -10 minutoj |
| **Ludantoj:** | minimume 4 |

La sube listigitaj tempo-difinoj estas skribitaj sur kartoj disdonendaj (aŭ elekteblaj) al la ludantoj. Ĉiu partoprenanto faras slipeton kun sia nomo kaj metas ĝin en sakon. La ludantoj elektas el la slipetoj unu, tiel ĉiu havas unu nom-slipeton kaj unu karton kun tempo-difino. (Se iu prenis la propran nomon, tiu remetu la slipeton kaj prenu novan.)
Kun iom da fantazio la ludantoj skribas kaj poste laŭtlegas „klaĉojn" pri la lotumita samgrupano, uzante la ricevitan tempo-difinon. La grupestro (instruisto) diras kelkajn spritajn sed ne ofendajn ekzemplojn:

| | | |
|---|---|---|
| *(tempo-difino)* | B | *promenadas kun sia amanto.* |
| *(tempo-difino)* | C | *dancas surstrate.* |
| *(tempo-difino)* | D | *manĝas karoton.* |

Se estas malmulte da ludantoj, ĉiu ricevu du slipetojn kaj elektu du kartojn, tiel kreiĝas kompreneble du frazoj.

**<u>Enhavo de la slipetoj</u>**

1) DUFOJE JARE

2) ĈIUNOKTE

3) POST NOKTOMEZO

4) KELKFOJE

5) JE LA KVINA MATENE

6) ANTAŬ OL TAGMANĜI

7) EN ĈIU DUA SEMAJNO

8) TRE MALOFTE

9) LA UNUAN LUNDON DE LA MONATO

10) TRE OFTE

11) NENIAM

12) EN JANUARO

13) PRESKAŬ ĈIAM

14) ĈIUSABATE

15) FOJE

16) MULTFOJE

17) TAGE KAJ NOKTE

18) DE MATENO ĜIS VESPERO

19) JE PASKO

20) ĈIRKAŬ LA KVINA MATENE

21) FINE DE ĈIU MONATO

22) DUM TAGMANĜO